
PRINCETON UNIVERSITY
RECEIVED
1921
THE LIBRARY

# AMERIKA ESPERANTISTO

OCTOBER, 1921



Castle Hradcany

OFFICIAL ORGAN OF

THE ESPERANTO ASSOCIATION

OF NORTH AMERICA

Digitized by Google

# AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

**a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.**

Yearly Memberships: Regular $1.00: Contributing $3.00: Sustaining $10.00; Life Members $100.

**CO-EDITORS: NORMAN W. FROST H. M. SCOTT MRS. I. M. HORN**

## CLUB DIRECTORY

**This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.**

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—$1.00.

BERKELEY, CALIF.
Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 62nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.
Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Bibliotekisto, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.
San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall, F-ino Evelyn M. Rosher, 125a Beulah St.

Kalifornia Esperantista Rondaro meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secy., 946 Central Ave.

MONTREAL, CANADA.
Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.
Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

TORONTO, CANADA.
The Toronto Esperanto Club meets every Saturday at 7. P. M. at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. .Sec.,E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

WASHINGTON, D. C.
La Kabea Esperanto Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thomson School, XIIth and L Sts., N. W. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.

Kolumbia Esperanto Asocio. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

CHICAGO ILLS.
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

BOSTON, MASS.
Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.
Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

PORTLAND. ME.
Portland Esperanto Society. Mrs. E. C. Flint, Sec., 16 Sherman St.

DETROIT, MICH.
Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M-9P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.
La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave. B. Lendo, Sek. 3596—29th St.

HEBRON, NEBRASKA.
La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun Ĵaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

HOBOKEN, N. J.
"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

NEW YORK CITY, N. Y.
The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the fourth Sunday of each month 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Av.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.
La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

ERIE, PA.
La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, inĝ., St. John Kanty College eldonas ½-jaran jurnalon, "La Studento," jara abono $1.00.

PHILADELPHIA, PA.
Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts.

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo., Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave. 19

PITTSBURGH, PA.
Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.
Hesperus Esperantists. S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Digitized by Google

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

WEST NEWTON 65, MASS.

Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

Published and distributed under permit No. 843 authorized by the Act of October 6, 1917, on file at the Post Office of Boston, Mass., By order of the President, Will H. Hays, Postmaster General.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

One Dollar a Year. Single Number 10 Cents.

Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 28. October, 1921. No. 6.

## THE COROLLARY TO DISARMAMENT—DO YOUR PART

When the world's representatives meet in Washington the majority of the world's people will be hoping and praying that the effort succeed, despite the almost deprecatory attitude of the leading participants. These leaders, having risen to political power as champions of a party, a section, or at widest a single nation, cannot easily give up the offensive and defensive attitude towards others; have not learned to think in world terms. The **people's** will must effect a satisfactory agreement if there is to be one. There is no way in which we, the people, can shift the responsibility and work upon a few representatives.

If we want disarmament and peace it is up to **us** to get it. There is only one way to get disarmament, by one and all demanding it. It is absolutely necessary that in the different nations we get together and demand that our own leaders **lead**—for **example, that we** Usonans demand that the United States make concessions with or before the others, in order to obtain world accord.

---

**The League of Nations, Sept. 15, decided to place the question of public school Esperanto instruction upon the order of the day for the coming session of 1922 and asked the secretariat to prepare therefor a full report.** —From Esperanto.

Digitized by Google

Are the individual members of the peoples all over the world ready to give in to others? Alas! they have not even learned to understand one another. Without that not even the utmost agreement would be better than "a scrap of paper." There is but one guarantee —a means of assimilation of ideas and ideals, one common standard for every individual on earth. We Esperantists have not all that the world needs, but we have that essential, a common standard—a common meeting ground of all that is psychical in mankind. One cowardly man may tell another ignorant man that the X race is plotting, deceitful, dangerous, to be feared and armed against; the Esperantist can stand up and say, "It is a lie **and I can prove it.**" And he can, for he can know the X race, know their thoughts, know their very hearts, thru the mediumship of a direct common tongue, Esperanto.

But even Esperanto cannot be obtained without effort, and unless the world's individuals are willing to make the effort to link themselves together—not by force, but by mutual understanding—the greatest possible result of the Washington congress will be but a Tower of Babel; a scrap of paper. Make that effort now!

—Prujno.

---

## ANGLA LINGVO SEN PROFESORO

### Ne komedio sed tragi-fakto

...."Ni devas konstati ke nuntempe la angla lingvo estas pli facile ellernebla".... (ol Esperanto).—Aforismo de ia idista saĝulo.

Tiu ĉi historieto havis sian komencon 15 jarojn antaŭ. Mi, tiam malriĉa gimnaziano mobilizinte mian monujon aĉetis preskaŭ samtempe du lernolibrojn: dikan, kelkrublan lernolibron de angla lingvo (en cent lecionoj) kaj kelkkopekan verde binditan libreton kun mistera nomo: "Lingvo internacia Esperanto" (en dek lecionoj).

Kun estimo kaj korbato mi malfermis bele presitan dikan volumon kaj enprofundiĝis en la du unuajn lecionojn ĉefparte konsistantajn el la priskribo de signetoj, montrantaj la vortelparoladon kaj kiel aldona surprizo—du paĝoj de samsonantaj vortoj por parkera ellernado. Fina paĝa de leciono instruis nin pri la sintenado dum la vizito en angla familio: kiel oni devas sidi, manĝi, purigi la nazon (sian, kompreneble) ktp. Sed la plej terura estis aldona piednota rimarko: "Post hodiaŭa leciono ni ellernis milokdek vortojn."

Mi honeste konfesis al mi ke mi ne ellernis kaj ne ellernos ilin post kio kun facila animo mi transiris al la verdkolora broŝureto.

Tie mi ne trovis viziton al la esperanta familio, mia nazo estis indiferenta por aŭtoro; vere, la gramatiko estis suspekteme facila (nur 16 regulojn!) kaj por kontroli la aferon mi decidis tuj transiri al la ekzercaro des pli ke aŭtoro feliĉe forgesis diri kiom da ellernotaj vortoj mi jam havis.

La dika libro instruis min per solidaj ekzercoj: "The book is dear" aŭ "This gentleman is rich." Verdlibreto estis pli facilanima: "La kolombo estas birdo" aŭ "la leono estas besto," sed tuj deziris

Digitized by Google

esti pli solida kaj aldonis instrutone: "al leono ne donu la manon. Doni la manon al leono estas danĝere." Post tiu leciono mi firme decidis ke mi neniam donos al leono la manon eĉ se ĝi al mi ĝentile proponos.

Iom post iom mi atingis la kvaran lecionon de la dika libro; ĉe fino estis aldonita minaca rimarko:

"komencante de la kvina leciono la lernanto bezonas anglan vortaron."

Por mi tiuj vortoj estis tragediaj: mia monujo unu foje mobilizita rifuzis duan fojon prezenti al mi necesan sumon de unu spesmilo.

La dika volumo kuŝis kviete atendante la morton de ia onklo en Ameriko aŭ la proksiman Kristnaskon kiam mi povus aludi la gepatrojn pri necesa vortaro.

Verda libreto ankoraŭ ne postulis vortaron kaj distris min per revema "La feino" kaj aliaj dolĉaj melodioj.

....Antaŭ Kristnasko mi, kiel bandito **postulis** ĉe gepatroj iom da spesdekoj por **esperanta** vortaro.

Unu jaron post mi jam estis subredaktoro de unua ruse-esperanta gazeto kaj redaktis unu el gravaj fakoj: "anoncoj"; la tempo sufiĉis al mi kaj intertempe jam kiel studento universitata mi perlaboris monon por la angla vortaro.

Bele bindita ruĝa vortaro solene kuŝis kun la lernolibro sur mia tablo. Komencita estis la kvina leciono sed baldaŭ kunmetitaj verbformoj malĝojigis min ĝis la distreco—foje ĉefredaktoro vokigis min kaj diris severe:

"Ĉu vi redaktas vian fakon aŭ flirtas kun esperantistinoj? Denove estas aĉa preseraro: devas esti presita 'diino de kolero'—kaj kion vi redaktis.—'diinon de ĥolero,' ĥolero vin mem formanĝu! kion do vi havas en via kapo?"

Mi havis en mia kapo teruran kunmetitan "second future" sed ĉu redaktoro de la esperanta gazeto povus kompreni anglalingvajn suferojn!....

....Mi jam estis "nia eminenta," jam redaktis "poŝtan fakon" de nia gazeto kaj en la albumon de "konataj esperantistoj" oni ne enpakigis mian fizionomon nur pro tia malagrabla kaŭzo ke miaj lipharoj ne volis kreski kaj mi aspektis abomene juna por esti "konata."

En privata vivo mi estis jurstudento kaj kiel tia (ne kiel redaktoro de poŝta fako) mi konatiĝis kun unu juna amerikanino.

La sukcesoj en la angla lingvo komencis marŝi iom pli vigle. Post mallonga tempo mi bone konis speciale elserĉitajn en la vortaro "dolĉajn" vortojn: "koro, kiso, luno" kaj parkere ellernis konjugacion de verbo "to love"—ami.

Sed mia amerikanino estis pli solida virino kaj tradukis por mi maldolĉajn ekzercojn:

"La tempo estas la mono" aŭ "La riĉan homon oni imitas, la malriĉulon evitas" kaj, ho ve! post mallonga tempo mi estis "evitita" kaj miaj anglaj progresoj haltiĝis.

....Mi finis la Universitaton. Ricevinte patenton de mia jurkapableco mi eksciis ke ekbrulis la mondmilito (mi ne estas certa ke la mondo tiamaniere volis solenigi tiun okazintaĵon de mia vivo).

Digitized by Google

Mi estis vokita militservi kaj kiel "militistemulo" estis elpelita el "poŝta fako"—en transeojn do nur iafoje mi ricevadis la anglaĵojn kaj esperantaĵojn. La lastajn mi atente legis, la unuajn mi nur rigardis vane penante diveni la sencon de la surskribo sur bildo de ia beleta dancistino en "The Sketch." La esperantaj gazetoj estis pli moralaj kaj presadis anstataŭ dancistinoj—portretojn de iaj dikaj esperantistoj kun misteraj literoj ĉe iliaj nomoj: "K," "L.K.", "K.K.K." aŭ tute nekompreneblaj "ILEP" "EEAS."

Estas malfacile por mi konfesi, sed mi (ho pekulo!) pli volonte rigardis dancistinojn ol "EEAS" kaj "ILEP."

Kun malfacileco kaj uzo de vortaro mi tralegis en unu angla gazeto tre trafan respondon de iu angla generalo pri la fino de milito. "Kiel mi opinias"—diris sincera generalo—"la fino de milito estas plejverŝajne—paco."

Bedaŭrinde la sprita generalo maltrafis!

" Militon ni ne daŭru, pacon ni ne subskribu."

Sed mi, mi surskribis la pacon kaj en januaro 1919 mi estis en Germanio. Miaj kolegoj komencis flame lerni germanan lernolibron; mi, firma kaj forta kiel skota viskio, daŭris mian anglan. Vere, mi jam aĉetis la alian lernolibron iom pli malgrandan kie la kunmetitaj verbformoj ne estis tro estimataj kaj ne estis priskribataj "riĉaj gentleman-oj" sed estis pli sinceraj dialogoj;

—Kion signifas la bruo en la najbara ĉambro?

—Mia onklo tie manĝas pomojn!

Fine miaj laboroj kroniĝis per neatendita rezulto. Mi kaj miaj kolegoj estis sciigitaj ke ni devas veturi Anglion. Miaj ŝancoj tuj iris supren kiel Usona dolaro. Mi feliĉe finis la unuan parton de la lernolibro kaj mi decidis ke mi estu kontenta se mi sukcesos regajni per miaj anglalingvaj scioj le sumon elspezitan por vortaro kej lernolibroj. La ekzamentago venis. Nia vagonaro haltis ĉe Koeln limo de angla okupacio. Tremante mi alparolis anglan komandanton. Terure! mi malgajnis la ekzamenon! Sed tuj mi konsolis min ke mi dank' al tio ne komprenas komandanton ke li havas kvazaŭ plenan buŝon da kaĉo—la lernolibro nenion diris pri tia okazo, do mi decidis atendi alian okazon. Unu tago post rapida vagonaro venigis nin ĉe la bordoj de "pas de Calais" kie la angla vaporŝipo gasteme nin atendis. La kontrolisto angle ion demandis. Kolegoj tuj vokis min:

"Hej, tradukisto, iru tien ĉi."

Kun malbonaj antaŭsentoj mi timeme alproksimiĝis kaj danĝere rigardis la buŝon de kontrolisto: ĉu li formanĝis la kaĉon. Feliĉe, jes! Sed, ho ve! liajn anglajn vortojn mi tute ne komprenis kaj respondante la scivolemajn kolegojn mi klarigis:

"Tiu sinjoro lernis anglan lingvon laŭ alia lernolibro, ne laŭ mia."

Iu kritikis: "Lia estas pli bona ol la via." Miaj ŝancoj faliĝis kiel sovjeta rublo. Sed ne mia kredo je facila ellerno de angla lingvo. Mi decidis alimaniere kontroli mian scion: alian tagon mi estis en Londono kaj firmpaŝe alproksimiĝis al policano, komencante viglan interparoladon:

Digitized by Google

"Is it London?" "Yes, sir!"
"Piccadilly?" "Yes, sir!"
"Thank you. Good by." "Good by, sir."

Mi fieriĝis. Homon, kiu povas mallonge kaj enhavriĉe esprimi siajn dezirojn oni komprenas ĉiam.

....Nun mi sufiĉe bone parolas angle. Antaŭnelonge mi eĉ parolis grandan "speech" en agrabla societo dum vespermanĝo kiu havis bonan sukceson (mia parolado, ne la vespermanĝo!) Se mi ne aldonu la sentaŭgan rimarkon de iu kritikaĉo ke "iafoje al li ŝajnis ke la oratoro uzas anglajn vortojn."

Sed por estonteco mi decidis elekti alian vojon por lernado de la angla lingvo kiun mi volonte konsilos al ĉiu dezirnto (senpage!):

Por plej malkare kaj bone ellerni anglan lingvon vi devas elekti ian bonan angaln edzoduon, naskiĝi al tiuj geedzoj—kaj mi ĵuras ke post kvar, kvin jarojn vi perfekte parolos angle. Provu!

—S. A. Kowic.

## THE THIRTEENTH WORLD CONGRESS

The figures of the Praha Congress we already know and the wonder of them is scarcely gone. Over 2,500 members, of whom some 2,100 were present in person representing some two score lands and languages, even from Africa, Asia, the Americas, and Australia. It was truly an impressive gathering and a convincing proof to the world that Esperanto is alive and on its feet again after the strain of the great world war.

The converging streams first met at Dresden where all was excellently arranged and the 800 arrivals found their lodgings ready. Thursday A. M., the 28th of July, all met in the Vereinshaus and thence in eight groups set off to visit the notable sights: sculptures, museum, china, jewels, etc., returning to eat together. In the afternoon a sample lesson was given in a public school on Georgplatz, and in the evening in the Vereinshaus the congress was officially opened. Consul von Frenckell welcomed the guests, and Dr. Kemper of the town council likewise; after these spoke 24 national delegates, and others. S-ro von Franckell acted as interpreter and Dr. Lederman made a propaganda speech. Dr. Privat gave the information that the League of Nations, the International Labor Office, and the Red Cross had each delegated representatives. A concert in the evening and next morning all journeyed off to the baths at Pillnitz and the beer of Blasewitz. Returning the last evening was spent in a concert and international ball.

Saturday the caravan moved on to Praha the beautiful. Here trains were coming in from other directions too, loaded with samideanoj who all flowed out of their trains into one great crowd—we might almost say mob—that taxed the reception committee to its utmost, as well as the patience of some of the samideanoj. At last all got out into the city and reached the official akceptejo on the island of Zofin, there to meet old and new acquaintances. In the evening "The Small Nations" had a congress.

Digitized by Google

Sunday at 3 P. M. the great congress was solemnly opened in Smetana Hall of the House of Representatives with over 2,000 in attendance. To this waiting audience Prof. Wiedermann played La Espero. Then S-ro Isbrucker opened the congress and called to mind our late beloved Grabowski. Dr. Kamaryt was elected president, Dr. Arnhold and Mr. Warden vice-presidents and S-ro Pitlik, kun F-inoj Cense and Shupichova secretaries.

Dr. Kamaryt read a letter from Gen. Sebert and welcomed S-ino Zamenhof. Dr. Shusta, Minister of Instruction as representative of the government welcomed the congress. The vice mayor of Praha, S-ro Rotnagl, welcomed us in the name of the Chekoslovak people with its idealistic humanitarians; Hus, Komensky, Palacky, Havliček, Rieger, Masaryk, etc. Pres. Kamaryt then spoke, saying that the Esperantist movement, however rationalist and practical, had its own lofty ideal, and success was coming from the humble unknown who sacrificed for that ideal.

S-ro Isbrucher then read the report of the K.K.K.

Dr. Privat followed, opening the VIIth U. E. A. congress and winning by his oratory the usual applause. After complimenting the Czechs for their noble and wise men, he showed that the work of the U. E. A. in peace times was parallel to that of the Red Cross in war. Telegrams were sent to Masaryk and Benes.

The official government delegates followed: Dr. Nitobe of the League of Nations alone using a national language, the English. Then followed the national delegates.

S-ro Pleshe of New York responded for the United States.

The working sessions of the congress and of the U. E. A. took up various themes, but, of course, the great interest centered about the program for reorganization as presented by a committee set up by the Hague congress. (This report was to have been published not later than the spring of 1921, and therefore thought over by all, but for reasons which we can only guess at, it was delayed and sprung upon the congress without previous announcement.) Happily this proposal already had been somewhat modified and simplified from the printed text in committee meetings at Dresden, and altho it was of course impossible to take definite action at Praha—as it has been at all congresses since the original Antwerp resolution—there may be a complete report to the next congress.

The proposal as it stands today is about as follows:

That the existing international Esperantist organizations be united in one general organization to be set up under the name of "Universala Ligo Esperantista," the league to consist of (1.) members (a.) individuals and (b.) societies of any sort, and (2.) patrons, that is, non-Esperantist organizations and persons who give Esperanto moral or financial support.

Liganoj are to elect a committee of 6 members as a "Service" Committee, who will oversee the spread of practical and applied uses of Esperanto for commercial, scientific, or other objects. This will continue the labors and traditions of the U. E. A.

Digitized by Google

The societies are to elect a committee of 6, the "Propaganda" Committee, to run the central propaganda office of the League and continue the work of the E. C. O. in Paris, guard the archives, and pull the wires among the powers that be.

A "General" Committee of the league, to consist of the Service Committee, the Propaganda Committee, and three members elected by the Congress—in all, 15. The General Committee is to elect a President, two Vice-Presidents, a Head Secretary and a Head Treasurer, and to fix the league's official seat.

The "Directing" Committee is to consist of the presidents of the three committees preceding and the two vice-presidents of the last.

Delegates are to function just as U. E. A. delegates now do, as intermediary between their own locality and the league headquarters.

The individual statutes of the E. C. O., U. E. A., K. K. K,, A. K., and I. U. E. S. to be laid aside or changed to fit the league; the L. K. and A. K. to function apart from the league but to revise their own rules regarding new elections.

The "Central Treasury," receiving monies from all classes and from outsiders, to use it in maintaining L. K. and A. K. and the committee and departments of the league.

Each year the General Committee is to organize a World Congress with the aid of a local committee. At this congress members shall have full rights of discussion and investigation but no power of decisions obligatory over anyone, only resolutions and advice; these the Directing Committee shall submit to the vote of the General Committee or to the committee concerned or to a general vote of the league. Any profits on a congress to be split between the national organization, the league treasury, and the treasury of congresses.

The league is to publish the Oficiala Gazeto and Jarlibro.

This result the congress approved and asked the committee to work out the finances and statutes and try to obtain the consent of all parties, reporting thereupon to the congress of 1922.

In the evening a concert by blind musicians and singers took place on the island of Zofin.

Other subjects discussed during the congress were the following:

The proposal for setting up a fitting monument at Dr. Zamenhof's grave met with the approval of all. It is in the hands of a committee to whose treasurer, Mr. Page, one should send money.

Regarding the Polish proposal for introducing Esperanto in the schools there was a great difference of opinion with the prevailing sentiment that it was best to work up from the people to the governments and seek first the instruction of Esperanto as an optional study in individual schools, with perhaps some propaganda with the League of Nations or separate governments.

The question of the Esperanto Ligilo was taken up and it was the general opinion that the best way to sustain this work among the blind was by an added per cent payment for association memberships or magazine subscriptions. A committee was appointed to put the plan into operation.

Digitized by Google

The proposal of S-ro Ziegler for a central publishing organization was rejected.

The Finland Association proposed the union of our magazines into a single one in Esperanto, the rest in the national tongues. After prolonged discussion it was decided to merely express the desire that the samideanoj restrain themselves in the issuing of new magazines except specialist ones.

On the last day of the congress, after a number of reports and resolutions, the question of the next congress was taken up. After considering invitations from Weisbaden and Danzig it was suggested that Finland take the 14th instead of the 15th congress. It was felt that the congresses were already getting unwieldly in numbers and that it would be best to hold some in more remote countries for the sake of propaganda. Canada, Africa and Japan were mentioned. Helsinki, Finland, was accordingly accepted for the 14th and Tokio, Japan provisionally fixed upon for the 15th.

The entertainment features were most enjoyable altho some of them, such as the excursion to Nova Karsto in Brno, suffered somewhat from an unexpected number of participants, swamping the accommodations. There was also some discontent over the local customs of fees and surcharges for late hours. But thruout the congress one felt a growing sentiment of harmony and enthusiasm.

The evenings at Praha were a great success: first getting acquainted, then a musical and gymnastic program, thirdly the international costume ball, fourth the theatrical presentation of "La Nokto en Karluv Tyn." The blind gave a most delightful entertainment; seventy-three blinduloj were present at the congress.

## LA "ESKIMA" ESPERANTISTO

Antaŭ jaroj, eĉ antaŭ ol organiziĝis la E. A. N. A., okazis ke du membroj de la Philadelphia grupo interdiskutis pri la venonta balotado en la tiama "American Esperantist Association." S-ro J. estis diranta, "Jen estas kelkaj kandidatoj proponitaj per tiu-ĉi cirkulero" kaj li legis al sia kunulo la liston de kelkaj oficoj kaj kandidatoj inter kiuj troviĝis nomo de iu S-ro Geoghegan. Parenteze mi klarigu ke tiu sinjoro estis tiam bonekonata en la Esperanta movado kvankam la du diskutantoj ne tion sciis,—eĉ, verŝajne, neniam aŭdis pri li. "S-ro Geoghegan?" demandis S-ro F.; "kiu li estas kaj kie li loĝas?" La alia ree rigardetis la cirkuleron kaj respondis, "Mi ne scias, sed lia hejmo estas donita kiel 'Fairbanks, Alaska.'" "Alaska?" diris S-ro J., "ĉu li estas sovaĝulo,—eble eskimo?" La alia ree legis la liston. Subite li ekkriis, "Vi estas prava!" kaj montris al sia kunulo la ridegigan linion, "Richard Geoghegan **Esq.**"

H. W. Hetzel.

* * * * * *

**Kantistaĉo.**—La gastigantino penegis instigi S-ron Harper ke li kantu. Post la kantado ŝi diris al li, afable, "Nu, S-ro Harper, "vi devas neniam poste diri al mi ke vi ne povas kanti; mi estas vin aŭdinta." —Queenslander. —Bopomano

Digitized by Google

## PAROLEJO

Al la esperantistaj organizaĵoj de ĉiuj landoj kaj al la izolaj geesperantistoj!

Karaj Gesamideanoj!

Niajn apudvolgajn regionojn vizitis terura gasto, pli terura ol epidemio, pli mortiga ol milito, pli dezertiga ol tertremo aŭ superakvego. Tiu ĉi terura gasto estas—**malsato!**

Malsatas pli ol dek milionoj da loĝantoj.

Por helpo al la malsatantoj ne sufiĉas nur penoj de regnaj organoj, tial al la laboro alpaŝas ĉiuj societaj fortoj de la lando. Estas organizita Tutruslanda Komitato por Helpo al la Malsatantoj, kiu laboras sub la signo de la Ruĝa Kruco.

La inicianta grupo de petrogradaj geesperantistoj organizis Tutruslandan Esperantistan Oficejon por Helpo al la Malsatantoj, al kiu ĝi komisiis, altiri al la laboro ĉiujn geesperantistojn de la tuta mondo

Karaj gesamideanoj! Montru al la tuta mondo, ke ni ne estas nur esperantistoj-idealistoj, propagandantaj eksklusive la ideon pri la lingvo internacia! Montru ke ni havas ankaŭ internacian koron kaj animon, kiuj kapablas profunde senti, sed ankaŭ energie batali kontraŭ tiuj malfeliĉoj kaj mizeroj kaj venki ilin!

Faru do la plej grandan propagandon de la ideo pri helpo al la malsatantoj, tiel per organizado de specilaj lekcioj, raportoj, vesperoj, kiel ankaŭ per alvokoj en diversaj lokaj pres-organoj. Propagandu samtempe sub la signo de Verda Esperantista Stelo kaj de Ruĝa Kruco! Prenu sur vin la inicion al kreado de lokaj Esperantistaj Oficejoj por kolektado de ĉiuspecaj objektoj, ne ĝenante vin per la kvanto de tiuj objektoj kaj memorante, ke ĉiu peco da pano, ĉiu glaso da lakto, ĉiu peceto da sukero trafos en la buŝon de malsatanto kaj eble savos lin de kruela morto!

Penu altiri al la afero ne nur ĉiujn geesperantistojn, sed ankaŭ iliajn amikojn kaj konatojn kaj la lokan loĝantaron! Partoprenigu ĉiujn lokajn komitatojn por helpo al la malsatantoj sub la nomo de Esperantaj Sekcioj! Ĉiun kolektitan sumon sendu per poŝto kaj telegrafo aŭ per poŝtfervojaj sendaĵoj aŭ senpere laŭ la adreso de Tutruslanda Esperanta Oficejo por Helpo al la Malsatantoj, Petrogrado, Italjanskaja n-o 31, aŭ transdonu al lokaj reprezentantoj de Tutruslanda Komitato por Helpo al la Malsatantoj; en la lasta okazo petu pri enkalkulo de tiuj aferoj en specialan Esperantan Fondon!

Plenan informadon pri ĉio, kio estas farita, ne pli malofte ol unu fojon dum semajnoj sendu al la redakcio de "Sciigoj de Tutruslanda Esperanta Oficejo por Helpo al la Malsatantoj," Petrogrado, Italjanskaja n-o 31!

Memoru, ke ĉiu, eĉ plej modesta objekto, donota de geesperantistoj, estos samtempe bonega kaj efika propagandilo de Esperantismo; memoru, ke laŭ nia laboro, farota praktike en la tutmonda amplekso, ĉiuj popoloj juĝos pri la potenco kaj unuiĝo de niaj esp. organizaĵoj, pri la disvastiĝo de Esperanto kaj ankaŭ pri la simpatio kaj konfido, kiujn havas la geesperantistoj kaj ilia agado ĉe la loĝantaro!

Digitized by Google

Ĉiuj al la laboro!
En la nomo de Tutruslanda Esp. Oficejo por Helpo al la Malsatantoj
La Prezida Komitato: A. G. Bikovskaja; V. N. Devjatnin; K. Muhlberg; V. A. Selivankin; G. Ĉaĉe; E. Drezen; Majnov; Dmitrijev; Radinkov|Neradov; Ambroz. —El Esperanto Triumfonta.

**Propono de Pola Esperantista Societo al la XII-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha**

Pola Esperantista Societo, konsiderinte ke nia ĉefa taktika celo en la realigo de nia programo estas inklinigi la ŝtatojn enkonduki Esperanton en la lernejojn, kiel devigan lingvon, petas XII-an Universalan Kongreson de Esperanto en Praha, ke ĝi elektu komisionon, kiu sin turnos al ministerioj de la publika instruado en ĉiuj konstituciaj parlamentaj ŝtatoj, proponante, ke ĉiu el ili promesu eventuale enkonduki Esperanton, kreitan de d-ro Zamenhof, en la programon de la lernejoj de sia lando, kiel oficiale internacian, helpan lingvon, se samtempe ĉiuj aliaj, aŭ almenaŭ la plej gravaj el ili, ankaŭ konsentos fari la samon. La komisiono finos sian taskon post la publikigo de la rezultatoj de tiu ĉi enketo.

CENTRA OFICEJO DE ESPERANTISTOJ DE LIGILO

1 Majo, 1921a jaro.

**Malfermita Letero**

Al ĉiulandaj Esperantistoj de Poŝto, Telegrafo, Telefono kaj Radiotelegrafo.

Karaj Kamaradoj!

Ni rusaj Poŝt-, Telegraf-, Telefon- kaj Radiotelegraf-istoj, unuigitaj en ligo de oficistoj de ligilo dezirante starigi reciprokan informadon kun ĉiuj kolegoj-oficistoj de la tuta mondo, decidis ĉe nia tutruslanda kongreso studi lingvon Esperanto por interŝanĝi per ĝia helpo la pensojn kun Vi.

Nuntempe ni jam havas ĉiuloke de la lando ĉirkaŭ 45 esperantajn kursojn por oficistoj de Ligilo, kaj krom tio en nia supera lernejo—Elektroteknika Instituto de Ligilo, Esperanto estas instruata kiel deviga lerna fako; en nia ĵurnalo kaj bulteno estas presataj artikoloj pri esperanto kaj adresoj de esperantistoj.

Ĉio tio pruvas ke baldaŭ estas venonta la momento kiam multaj rusaj oficistoj de Ligilo povos ekligi kun vi amikan korespondadon, per kio ni plifirmigos nian reciprokan solidarecon. Sed por ke tio efektiviĝu, kamaradoj, vi devas nin helpi. Vi devas nin informi, kiagrade vi partoprenas en la esperantista movado de via lando; kiel estas organizitaj viaj profesiaj ligoj kaj precipe vi devas havigi al ni adresojn de ĉiuj esperantistoj de Ligilo, kiuj estos presataj en nia ĵurnalo. Ni dezirus havi viajn ĵurnalojn, gazetojn, dediĉitajn al Ligilo kaj esperantajn gazetojn, kaj ankaŭ ni petas pri viaj grupaj fotografaĵoj interŝanĝe kontraŭ la niaj.

Pri nia profesia ligo ni komunikas, ke ĝi ĉe 1 da Majo unuigas ĉiujn oficistojn de Ligilo en Ruslando nombre 185,000 anoj.

Ni havas unikan ligon sen ĝia divido je superaj kaj malsuperaj oficistoj.

Digitized by Google

Ĉiuj anoj estas unuigitaj per lokaj komitatoj (ĉe poŝtoficejo), per ujezdaj (landa administra divido) kaj guberniaj filioj de la Ligo. Ekzistas 80 guberniaj filioj.

Frunte de la Profesia Ligo staras Centra Komitato, kiu troviĝas en Moskvo. Centra Komitato estas elektata ĉiujare dum la tutruslanda kongreso de la Ligo kaj konsistas el 21 anoj.

Nia Ligilo aktive partoprenas la socian vivon de la lando, kaj la administrantan aparaton de Ligilo.

Analogiaj informoj estas petataj de vi.

Ni atendas viajn leterojn.

Korespondaĵon oni adresu: Ruslando. Moskvo, Ĉudovskoj 6. Esperantista Oficejo ĉe Centra Komitato de Ligilo.

Kun kamarada saluto

Prezidanto de Centra Oficejo de esperantistoj de Ligilo

N. Modenov.

P. S. Insista peto al ĉiulandaj esperantistaj organizaĵoj kaj esperantistoj konigi ĉi tiun malfermitan leteron al ĉiuj oficistoj de Ligilo (Poŝto, Telegrafo, Telefono, Radiotelegraf-istoj) kaj publiki ĝin en la presorganoj esperante kaj nacilingve. N. M.

(Centra Komitato de laboristoj kaj oficistoj de Ligilo).

* * * * * *

## VIRINA KONTRAŬMILITA LIGO INTERNACIA

Lasttempe stariĝis en Paris. Ĝi intencas ĉiel eble batali por rapide ĉesigi la fratmortigajn batalojn. Ĉiuj virinoj dezirantaj ekinterrilatiĝi kun la Ligo estas petataj sin turni al S-ino Lariviere, 14 rue Liens, Paris IV.

(Esperanto estas uzata por la eksterlanda korespondado.)

---

## PRESS NOTICES

Das St. Josephs-Blatt, St. Benedict, Oregon, Sept. 15, 1921, and Amerika, St. Louis, Mo., August 28, noticed the Esperanto edition of Struwwelpeter.

La Patria, of Oruro, Bolivia, Aug. 6, 1921, has an article of eight columns by S-ro Modesto Millan upon Esperanto giving an excellent summary of the movement for Spanish readers. The article can hardly fail to arouse the intelligent of Bolivia to an appreciation of the value and growing importance of Esperanto. We note a marked increase of Esperanto activity all along the Andes.

The New York Evening Post, Hudson Observer, Hudson News, Hudson Despatch, and New Jersey Post are all reported as having articles upon Esperanto or Esperantist activities.

---

## ENLANDA KRONIKO

**Weehawken, N. J.**—Sept. 13an kunvenis la Hudson County Esperanto Society ĉe Prez. J. J. Sussmuth. La societo elektis 'Amerika Esperantisto'n kiel societan gazeton, akceptis regularon, kaj diskutis agadplanojn. Raportis Hudson Observer, Hudson Dispatch, Hudson News, kaj New Jersey Post.

**Montpelier, Vt.**—S-ro Hetzel trapasante la urbon ĝojis la lokan samideanaron per vizito.

Digitized by Google

**New York, N. Y.**—La vigla Harmonio havis dum la somero tri ekskursfestojn: unuan en la Cortlandt Park 50 ĉeestis, duan en la Interstate Park 48 ĉeestis. Agado rekomencis kun la barĉo. La unua barĉo okazis sept. 9. en Hotel Endicott (Columbus Ave. kaj 81st St.) kun 49 personoj. Malfermis la kunvenon tablomajstro S-ano D. A. Klaĝin kaj post li paroladis S-roj Morton, Arnold, Sayers, Ortega, kaj Sussmuth, kaj S-ino Mary H. Ford de la Bahaja revuo Reality. Artpecon sur fortepiano F-ino Spector, kaj Tereseta Gascon-Ferrer deklamis du pecojn el sia patruja literaturo. S-ro Klaĝin sciigis pri alveno de leteroj el Rusio, kie Esperantistoj suferadas pro malsato, kaj memorigante pri la helpo sendita siatempe al Vieno, Graz, kaj Budapest, kaj multe aliaj urboj en Germanio, li petis financan helpon al niaj samideanoj en malproksima Rusio; post kelkaj minutoj $45 estis kolektitaj. Oni kantis: La Esperanto, Swanrivero, kaj krom tio eta ĥoro kantis la esperante tradukitan rusan kanton, Tri Ĉevaloj. Je la 11a komencis dancado kaj la festo fermis je la 1a horo nokte.

La proksima barĉo okazos vendredon, okt. 14., kaj estas necese ke ĉiu Esperantisto ne nur ĉeestu ĝin, sed skribu al la Harmonio kun kiom da geamikoj li venos por ke hotelestro povu prepari sufiĉe da manĝaĵo. La iama loko, Little Rumanian Casino, estis jam tre malgranda por sidigi tiom da partoprenantoj, kiom ni havis en la junia barĉo, 76. Ĉiu Novjorka Esperantisto farus bone ĉeesti tiun ĉi barĉon ĉar ju pli granda nia nombro, des pli digna aperas nia movado en okuloj de novuloj!

**New York, N. Y.**—Rememoru la New York Esperanto Society Barĉo'n la kvaran dimanĉon ĉiumonata je Hotel Endicott.

**Washington, D. C.**—Klaso de 11 lernantoj komencis kunsidojn Sept. 7. je la Thomson Lernejo; kondukas B. P. Mann.

**Boulder, Colo.**—Klason de dekdu knabskoltoj je la Univ. de Colo. Y. M. C. A. kondukas W. A. Buchheim; kunvenoj lunde, merkrede, kaj vendrede.

**Erie, Pa.**—La Pola Studenta Societo de Kanty College enhavas ĉirkaŭ 40 anojn. Unu klaso funkcias.

**Boston, Mass.**—La barĉo kvinsabata okazos Okt. 29an je 507 Pierce Bldg. Elkorba vespermanĝo je 6.30 P. M., paroladoj, novaĵoj, muziko, ktp. Ĉiujn samideanojn ni invitas kaj precipe ĉiujn eksanojn de la antikva New England Division. Venu mem aŭ sendu salutojn.

—Lastatempe ni ĝuis viziton de S-ro Hu Keyes.

—Sept. 14. edziĝis en New York S-ro Hatsoff kun Etta Goldings, samideanino de la Bostona societo. Ĉiujn feliĉojn!

—Oct. 15. okazos je la "Eklezio de Ĉiuj Nacioj," Boston, edziĝo de Samideanino Ester Terruso de Bostona societo kun S-ro Malouf.

—Du klasoj nun funkcias: komenca de S-ro Lee, kaj parolada (progresinta) de S-ro Frost, ankaŭ ni tenas promeson de **D-ro Lowell, L.** K., ke li instruos komencan klason. Rapide aliĝu!

**Philadelphia, Pa.**—Sekr. S. Zysk de Esperanto Stelo de Polujo nun vizitas parencojn en Varsovio, Polujo.

Digitized by Google

## EXECUTIVE COMMITTEE REPORT

New York, N. Y., Sept. 30, 1921.

Fellow-Esperantists:—

I regret to announce Mr. Hailman's declination of the appointment tendered him, a pressure of work being the unavoidable cause. We are pleased to have found an admirable substitute in the person of Mr. C. F. Russell, who has been appointed chairman of the Finance Committee. The work of the year is beginning in a most promising manner. The Propaganda Committee is getting well under way, and will soon have very definite news to give. All the signs are of promise. Let every reader who is not yet a member of the E. A. N. A. add to the accumulated momentum, by joining it at once. Unorganized Esperantists are only half Esperantists, and are of little help in spreading the movement, the increased strength of which makes Esperanto of enormously greater practical value to them as to others. Similarly, members who have not yet renewed should do so at once, and thus help the finances of the Association. A dollar now is worth much more than later in the year.

The question of the next meeting-place is one of the difficult problems. It is desirable not to wait until spring before deciding this matter, since time is needed for adequate preparations and for the publicity which is one of the great advantages of our Congresses. Two or three cities are under consideration, but there is still time to hear from others. Any middle western city which can show sufficient Esperanto activity and real desire for the Congress will deserve special consideration. Why not have a lively competition for the honor? Those who know the delights of our Congresses will appreciate the privilege of having one in the home town. The decision is in the hands of the Executive Committee; and it is intended to have the matter settled by the beginning of next January. So let candidates for Congress seat get busy without delay! Send invitations, arguments, statements of special qualifications and other data to the undersigned at 211 West 138th St., New York City, N. Y.

Fraternally yours,
James F. Morton, Jr.
Chairman of the Executive Committee.

---

I take pleasure in announcing as having met the requirements of the **Ekzamen-Komitato** for the **Elementa Diplomo**:
Mr. Albert M. Koliner, 607 Breitmeyer Bldg., Detroit, Mich.
Mr. Alvis Wetzko, 2313 Dubois St., Detroit, Mich.

The second of these passed the examination with "honorable mention" (93.5%); the first gave evidence of his proficiency by other means.

Examinations Committee,
Henry W. Hetzel,
West Phila. High School for Boys.

Digitized by Google

## RECENZA FAKO

**Vollstaendiges Lehrbuch der W. Esperanto,** Mobusz, 4th ed., 130 pp., boards, 2M.—a well printed textbook of the old methodical sort suitable especially to the school.

**Kia Stranga, Forta Voko,** Schulhof, Klemetti—4 part music 3 R. K. at Esperanto Oficejo, Kasarminkatu 20, Helsinki, Finnland.

**Dokumentoj de Esperanto,** Mobusz, Esperanto Verlag, Berlin S 59, 200 p., price not shown—a work of unsurpassed value for the serious Esperantist, as it contains in perfect Esperanto large excerpts from the historic documents themselves. Excellent as a text for advanced classes.

**Vortaro de Komercaĵoj** (Frankfurt a. M. Fair), 12 pp., 1M.—By means of this Esperanto german index one can find directly the German titles of the desired merchandise.

**La Struvelpetro,** Hoffman, Applebaum, 24 large illustrated sheets in boards, 27M.—As a teacher we must state that the frightening themes of this book make it unfit for impressionable children; for their elders or those already hardened to such stories it will give great amusement and be an apt means of learning to read Esperanto. The versification and Esperanto are above reproach, tho we note one or two press errors, e. g. Rakanto, p. 24.

**Legolibro,** William, vol. 1, 64 pp., 9 M., Esp. Verlag F Ellersiek, Berlin S 59, new anecdotes.

**Interesa Novelaro,** Fethke, 36 pp., 3 Resp. K. at F. Fethke, Oppeln Ring 11, Upper Silesia, Germany (.)—seven short stories translated from Averchenko, Corday, and others; somewhat more obscure and lyric than usual, and seem to express minds unsettled by the war. We dislike "remizo" for veturilejo.

**La Vendreda Klubo,** Dietterle, 116 pp., 15M. at F. Hirt & Sohn, Leipzig, Germany—an important and most valuable collection of essays on Esperanto and other subjects. We note a number of neologisms, or doubtful usages e.g., kelkiu pp 8 & 63, kelkiam 12 & 15, postkiam 16, intuo 22, ĉiukaze 23 and kazon 78, anticipu 23, fiblo 27, 28, adekvata 78, bunta 80, inercio 105, havis lokon 106. We have no objection to innovations if proven necessary, such as "bunta," but we prefer to retain the Zamenhofan roots where possible and as for the first two we haven't yet fathomed their meaning. "kelk" means "a certain" in the plural "certain," "some," "a few." "iu" means "anybody whatever" so we get for kelkiu, "a certain anybody whatever" and for kelkiam, "a certain at any time whatever." Other than these few kritikeblaĵoj, the book is a most excellent piece of work.

**Perloj el la Oriento,** Ossaka, 40 pp. ½ yen at Nippon Esperanto-Sya, Omotesarugakutyo 2, Kanda-ka, Tokyo, Japan—a highly interesting glimpse into the treasure cabinet of Oriental thought; includes a translation from the Luchan dialect. In our opinion this is one of the most notable if not the most notable publication of the year. It has a few press errors.

Digitized by Google

**Whs. Esperanto in 2 Wochen,** Pankratz, 40 pp. 14 lessons. 15 for $1.00 at Nowe Tory, Budgoszcz, Poland.

**Samouzek Esperanto w 10 lekcjoeh,** 64 pp. 15 for $1.00 same address, also post cards from 2 for a cent up.

**Das Deutsche Lied,** Pillath, 80 pp., 9M. at Esperanto Verlag, Berlin, Germany.—a compilation of some 50 popular songs Esperantized by F. Pillath, commended by Esperantista Literatura Asocio.

**Kantareto,** 1.25M. from above.

**La Pesto en Milano dum 1630,** Manzoni, Monti, 22 pp., 2L., A. Paolet, S. Vito al Tagliamento, Italy.

**Kiel oni fondas kaj Organizas Esp. Grupon,** Sappl, 48 pp., $0.20, Karmelita pl. 5, Graz, Austria. tells how to found a group.

**Anekdotaro, Susser,** 5 Kĉ., Jos. Kern, Saaz 26-VIII, Ĉzechoslovakia, 200 jokes from German and Bohemian.

**Mizerego kaj Suferego de la Nurnburgaj Infanoj,** 24 pp., with statistical charts, sent free on request to Nb. Kinderhilfe, Prof. Ledermann, Lauferschlagturn M 6 II Nurnberg, Germany.

**B. E. S.a Adresaro,** 3rd ed., 80 pp., $0.27 at Bohema Esp. Servo, Moravany, Czechoslovakia, 1000 classified addresses from all parts of the world especially central Europe. Especially valuable until Jarlibro reappears.

**Esperanto-Krestomatio,** Taubman, part 1, 6 Kĉ., 80 pages of graduated readings to accompany pictures or sketches for conversation class.

**Al Alilandaj Eldonistoj!** Se vi volas vendi librojn al Amerikaj samideanoj, estas dezirinde ke vi nomas por tiu ĉi fako unu definitivan prezon por ĉiuj kostoj ĝis la aĉetanto, ĉar la konfuzo de kromaj procentoj, kaj poŝt elspezoj nuntempe forpelas multajn aĉetantojn. Se oni timas kursŝanĝon ni nomus prezon fiksitan en spesmiloj (da oro), aŭ mono libere interŝanĝebla pare por oro. De tio ni povos kalkuli.

We have received several advertising leaflets in Esperanto and other languages from Muscat and Christlein, Nuremburg, Germany—specialties carbide lamps, pocket cigaret lighters, and safety razors They seek agents.

---

**DEZIRAS KORESPONDI**

Four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address. Additional matter: 10 c. per line or fraction thereof.

Kvarfoja anonco: 5 poŝtaj respond-kuponoj. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso. Plia linio aŭ parto: 2 r. k.

S-ro Jonas K. Miliauskos, Dideye Vilniaus G-ve, No. 34, Kaunas, Lithuania, Europe.

S-ro T. Tosnovikov, Sovetskaja St., Sarapul, Perm, Rusujo, petas Esperantajn librojn novajn aŭ malnovajn, serĉas eldonistojn de rusaj lernolibroj.

S-ro Hideo Jagi, Dai 3 Kotogakko, Kioto, Japanujo, deziras korespondi per I. P. K. kun ĉiulandanoj.

Arthur A. Smith, Van Wert, Ohio, U. S. A. (Usono) deziras korespondi kun artistoj kaj forografistoj, aŭ spertuloj aŭ lernantoj, vivantaj en ia loko de la mondo.

S-ro Luka Stephano, German Austria, Wien (Vienna) XV, Kranry 26, deziras interŝanĝi P. M.

Fujibajasi Teisi, Dai 3, Kotogakko, Kioto, Japanujo.

Malnova Esp-isto el Peterburgo, viktimo de bolŝevikoj plezure korespondos kun spertaj samideanoj el Usono, kiuj povus konatigi lin kun socia, literatura, ktp. vivo en Usono. Roman Sokowicz, Zielna 31 m. 4, Warszawa, Polio.

Herbert A Wallace, 1915 No. 13th St., Kansas City, Kans.

S-ro Masajiro Okumura, studento. Doshisha Universitato, Kioto, Japanujo. PLEG.

## OFFICE NOTES

October first being the beginning of the official year, the Central Office begs to call attention to the following:—

1. **Memberships:** Everybody join! $1.00 per year for regular members; $3.00 per year is a Contributing Membership which includes subscription to Amerika Esperantisto: $10.00 for Contributing Membership for those who are fortunate enough to be able to give that amount, which includes subscription to the Magazine and we will also send you a group of foreign magazines giving you a variety on file to show people that Esperanto is really International.
2. **Subscriptions to Amerika Esperantisto:** Every samideano needs the Magazine to keep posted on the activities in North America; it also contains brief notes of foreign news, culled from exchanges received.
3. **Club Directory:** Secretaries are particularly requested to have groups listed with time of meetings and a secretarial address.

If you are starting a group, send for a Group Charter at $1.00 with your first group of names; it will help to develop the group.

4. **Guarantee Fund:** On September 26th a third call of 25% for the year 1921 was sent out. This Fund is for the purpose of covering expenses of the Association which regular receipts do not meet, and additions to this fund will be gratefully received.
5. Send us the address of your Superintendent of Schools for use by the Propaganda Committee; also of your Scout Master if there is a Scout Group in your town. We will be glad to send sample copy of the Magazine and other propaganda matter to addresses on request.

Ni volas interŝanĝi ŝlosilojn po centoj kontraŭ tiuj de alilingvaj landoj. Skribu vian adreson aŭ sendu unu centon kun fakturo al Esperanto Office, 507 Pierce Bldg., Boston 17, Mass.

---

The author of the first article in our September number was erroneously given as Mr. Lee. It was from the pen of our president

We have decided despite the cost to us to get better acquainted with the groups. We therefore ask each group affiliated with the E. A. N. A. to send in a group photograph for reproduction together with the names of the members shown therein and an account, all in Esperanto, of the club activities or the occasion, the whole not to exceed 2 pages of A. E. We offer to give this space only once to a club and one to a number of A. E. and only if the photograph will reproduce satisfactorily. Therefore hasten and

Let's get acquainted.

---

### Ŝercoj

**Eksplikate.**—"Kelnero, kial vi ĉiam donas al mi la saman terpomon kiam mi eniras ĉi-tiun restoracion?" — "Ĉar, sinjoro, ĝi ĉiam restas post via foriro." —Voo Doo. —Bopomano

"La sola Leĝo de Pezoforto estas la neevitebla movado de du geamantoj sidantaj je la disaj finoj de benko je la parko." Voliva, estro de "Zion."

B.S.pol

Digitized by Google